



## Someraj salutoj

Estimataj klubaninoj, klubanoj, favorantinoj kaj favorantoj, jam pasis duono de la ferioj. Jam post unu monato ni denove renkontos. En la lasta letero ni demandis vin, ke vi skribu, kion ni faris por Esperanto dum kvaranteno. Pardonu, ke ni skribas nun. Ni longe atendis viajn respondojn.

Do, jen kion ni faris:

1. Tradukado de PrestaShop, la malfermitkoda programaro por retaj butikoj (Malovec, Kolka)
2. Parigo de 8000 ĉeĥaj kaj Esperantaj terminoj de arbarista vortaro (Malovec)
3. Skanado de materialoj de Zdeněk Hršel kaj Jan Werner (Malovec, Kolka)
4. Redaktado de Starto 2/2020 (Malovec)
5. Transdono de muzikaj tekstoj en Esperanto al muzika fako de Nacia Biblioteko kaj materialoj pri Kožík al Memorejo de literaturo en Rajhrad. Finita enkomputiligo de Kožík-romano Super valoj mateniĝas (tr. J. Vondroušek - bedaŭrinde sen lasta ĉapitro) (Malovec)
6. Enkomputiligo de terminaro de vaporturbinoj de Miroslav Tůma (Malovec)
7. Verkado de libro pri du flugilaj insektoj (Fischer)
8. Tradukado (Fischer)

Niaj klubanoj ankaŭ legis librojn kaj korespondis kun aliaj esperantistinoj

La programo por septembro estas jam preparita:

1.9. Konatiĝo kun nova klubejo kaj preparo de 120-jariĝo de la klubo en 2021

8.9. Ĉi-jara virtuala SES – Milan Kolka

15.9. Regiona Esperanto-Ligo – Miroslav Malovec

22.9. Krucenigmoj – Milan Kolka

29.9. Asociaj ekzamenoj – Miroslav Malovec

Sed ni ankoraŭ ne havas programon por sekvaj monatoj. Do mi petas vin, ke vi skribu al ni viajn proponojn. Ne forgesu, ke nia programo estas tia, kian ni preparos ĝin. Ju pli da homoj preparos programon, des pli bunta ĝi estos. Ne timu kaj venu.

De septembro ni renkontados en nova klubejo ĉe **Křenová 57**, apud tramhaltejo Masná. Niaj kunvenoj estos nove marde, de la 18-a ĝis la 19-a horo.

Ni esperas, ke homoj, kiuj ne povis venadi merkrede, povos venadi marde. Ni invitas ĉiujn esperantistojn kaj favorantojn, kaj maljunaj kaj junaj.

Venontjare estos la 120-a datreveno de fondiĝo de esperantista klubo en Brno. Ni ne lasu, ke Esperanto en Brno mortos. Revivigu nian agadon! Venu en la klubon kaj proponu, kion fari.

Ne forgesu, ĉi-jare **Konferenco de Ĉeĥa Esperanto-Asocio** okazos la de la 9-an ĝis la 11-an de oktobro en Pardubice. Rektaj rapidtrajnoj veturas el Brno en Pardubicen, la vojaĝo daŭras nur 95 minutojn.

Ni ankaŭ rekomendas alian okazaĵon. La 4-an ĝis la 6-an de septembro okazos en Svitavy **Aŭtuna renkontiĝo en Esperanto-Muzeo**.

En Památník českého písemnictví (Muzeo de ĉeĥa literaturo) en la urbo Rajhrad (10 km sude de Brno) okazas ĝis fino de la jaro ekspozicio pri **František Kožík**, verkisto kaj esperantisto.

Ĝis la revido septembre en nova klubejo!

Milan Kolka



Pozvánky Vám chodí, protože jste členy klubu nebo příznivci, kteří souhlasili se zasíláním pozvánek. Souhlas můžete kdykoliv odvolat, stačí to napsat v odpovědi na tento e-mail.

Program klubu můžete též zjistit:

- na našich webových stránkách (<http://www.esperantobrna.cz/malnova/program.htm>),
- na naší stránce na Facebooku (<https://www.facebook.com/esperantobrna/>)
- a na Eventa servo ([https://eventaservo.org/o/EO\\_Brna](https://eventaservo.org/o/EO_Brna))